

**KARAJ** gepatroj kaj infanoj aliĝintaj al infankongreseto **IJK 2011** !

Bonvolu

++ konfirmi ricevon de tiu ĉi IJK-komuniko al bertox@free.fr  
++ legi la tutan tekston detale kaj eble reagi,  
++ printi tiun ĉi paĝon kun ĉiuj haveblaj informoj kaj kunporti ĝin al UK.

**ADRESO** de IJK-ejo: **Gallebjerggård**, Galgebjerggårdsvej 17, 3390 Hundested.  
(La dana numero +45-4792 3290 estas la privata telefono de la luanto, s-ino Hansen)

**TELEFONA KONTAKTO** nur se gravaĵo, provu unue SMS-mesaĝeton:  
svisa numero +41-xx xxx xxxx de s-ino Adenjo Charrière, parolas dane kaj france  
belga numero +32-xxx-xx.xx.xx de s-ro Matthias Humet, parolas nederlande

**SABATA ALVENO:** Infanoj kun siaj valizoj kaj gepatroj alvenu sabaton, la 23-an de julio en UK-kongresejo "Bella Center". Infanoj povas kolektiĝi kun siaj valizoj ekde la 12-a horo en la salono "Noll" (laŭ la ŝtuparo preter la giĉetoj en la unua etaĝo turnu dekstren la unuan koridoron, unua pordo).

**ALVENA KUNVENO:** Sabate je **15:30** la gvidantoj prezentos sin kaj la IJK-programon. Ĉiuj IJK-anoj kaj gepatroj bv. partoprenu la jubilean kunvenon "De la 42-a UK al la 41-a IJK" okazanta de **16h** ĝis 17h30 en salono "Friis" (laŭ la ŝtuparo preter la giĉetoj en la unua etaĝo turnu dekstren la unuan koridoron kaj iru ĝis la lasta kunsidejo). Poste la infanoj ekiras (sen valizoj) por promeni tra la urbo ĝis la fama Marvirineto. Tie ilin atendas buso (kun valizoj), kiu pasas je 20h30 tra Eurolines-haltejo kaj alvenos post 21h30 en IJK-ejo.

**MERKREDA EKSKURSO:** Merkredon, la 27-an de julio, IJK tuttage ekskursas al akvo-amuzparko Sommerland Sjælland. Nia buso ekiras de IJK-ejo je 8h30 kaj revenas post 19h.

**ĴAŬDA GEPATRA TAGO:** La 28-an de julio, posttagmeze ĉirkaŭ 15h ĝis 18h (aŭ pli), ni atendas gepatrojn por komuna programo, por kune ludi. Pri kuna veturado ni sendis/os apartan mesaĝon.

**SABATA REVENO:** Ĉiuj infanoj revenos per buso al UK-ejo sabaton, la 30-an de julio, ĉirkaŭ 11h. Fine de la Solena Fermo en salono Zamenhof, ili kantos antaŭ ĉiuj UK-anoj. Post la fino, ĉiuj gepatroj konfirmu al Bert Schumann antaŭ repreni siajn infanojn. Informu se vi bezonas pli frue foriri.

**AŬTOMOBILA VENO** al IJK-ejo: Ĉirkaŭveturu la urbon sur E55, turnu norden sur straton 16 trans Hillerød, Frederiksværk ĝis Hundested. La IJK-ejo nomiĝas Galgebjerggård kaj situas sur strato Galgebjerggårdsvej. Distanco de UK-ejo: 80 km, 1h15.

**PUBLIKA TRANSPORTO** al IJK-ejo: Trajne ĝis Hillerød, poste Hundested st., poste piede 4 km.

**INFANOJ NEPRE KUNPORTU TION:**

- **san-** kaj **vaksinad-**kajeroj, san-asekura karto/formularo aŭ ties kopioj, kiujn la infano konservu.
- medikamentoj kun uzinstruicio, se necesas. Tiukaze informu nin.
- kremo kontraŭ sunbruliĝo, ĉapo kaj okulvitroj kontraŭ forta sunlumo.
- kremo kontraŭ kuloj
- pluv-vesto
- sapo, dento-pasto+broso, mantuko
- banvesto, bantuko, eble bansandaloj por eniri akvon

- dorsosaketo por porti piknikon, akvobotelon (NB: malplena akvobotelo kostas 1-2 kronojn)
- UK-kongreskarto, se vi ricevis, per ĝi prenu la kongresajn materialojn en UK-ejo.

#### INFANOJ LAŬEBLE KUNPORTU TION:

- valizo granda kaj plata, por facile ordigi kaj ŝovi sub la liton (mankas ŝrankoj)
- societaj tablo-ludoj, aliaj ludiloj, pilko, rakedo, volanludo ktp.
- ŝatata muziko sur KompaktDisko aŭ USB-memorilo por **diskoteko**.
- TONDILO, gluo, kraĵonoj kaj papero restaj el lerneja jaro por desegni kaj skribi.
- fotilon (se elektronika fotilo, kunportu ŝargilon kaj USB-kablon)
- foto- aŭ film-prezento pri via urbo sur KompaktDisko aŭ USB-memorilo, ni havos projekciilon kaj komputilon por montri sur muro. Informu nin.
- notu la nomon sur ĉiuj vestoj se la infano emas forgesi vestaĵojn.

#### INFANOJ NE KUNPORTU TION:

- valoraj objektoj (perdo kaj ŝtelo ĉiam eblas, kvankam gvidantoj atentas)
- elektronikaj ludiloj (tiuj kreas ĵaluzon kaj malhelpas kunan aktivadon)
- poŝmono (ni restos ofte en la IIK-ejo, kie ne eblas aĉeti)
- littukoj (tiujn donos la IIK-gastejo)

#### SANO:

- + Kaze de akcidento aŭ sanproblemo, ni konsultos kuraciston aŭ hospitalon, kiu decidos pri necesa traktado. Per transdono de viaj infanoj al IIK, implicite vi konsentas pri tiu maniero kaj vi engaĝiĝas repagi eventualajn kostojn. Ni provos kontakti vin kaze de gravaĵo.
- + La infano kunportas **vaksin-kajer**on aŭ ĝian kopion. Bonvolu informi, se via infano ne ricevis la bazajn vakcinojn (difterio, tetanoso, poliomjelito, tuberkulozo) kaj klarigi la kaŭzojn.
- + La feriejo situas je 400 metro de la maro, ni do iros bani kaj naĝi plurfoje. Tiam la infanoj restos sub kontrolo de plenkreskuloj/instruistoj, cetere ĉeestas sav-naĝisto. Bv. informi, se via infano ne konas aŭ ne respektas la limojn de sia kapablo naĝi, plonĝi, subakviĝi. Bv. informi, se via infano ne rajtas naĝi.
- + Informu viajn infanojn pri iksodoj, petu ilin averti gvidantojn kaze de haŭta inflamo. Ni havos specialan kroĉilon por turne eltiri iksodon. Legu [www.otom.com](http://www.otom.com). Post inflamo observu dum 3 semajnoj. Kaze de ia ruĝa inflama ringo konsultu kuraciston, kiu donos antibiotikon. Ekzistas vakcino kontraŭ iu viruso transdonebla de iksodoj. Informoj en <http://eo.wikipedia.org/wiki/Iksodo>

#### ALIĜINTOJ:

13 knabinoj de 4 ĝis 17 jaroj

15 knaboj de 5 ĝis 16 jaroj

6 plenkreskuloj de 23 ĝis 50 jaroj

14 loĝlandoj: Aŭstralio, Belgujo, Brazilo, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Hungarujo, Kameruno, Katalunujo, Kroatujo, Nederlando, Polujo, Slovenujo, Svedujo, Svisujo. (eĉ 4 kontinentoj!)

Viud fotetojn de ĉiuj: <http://bertosch.free.fr/iik2011/alighintoj.html>

**Ĝis baldaŭ un UK kaj IIK !**

Kore salutas Adenjo, Tina, Matthias kaj Bert por la IIK-teamo